

La filo

Antaŭ kelkaj monatoj Karina ekloĝis en tiu ĉi domo. La kvartalo plaĉis al ŝi. Ĝi estis trankvila, silenta, proksime al la centro de la urbo. La stratoj estis mallarĝaj kaj je du stratflankoj staris kvaretaĝaj domoj.

Antaŭ la domo, en kiu loĝis Karina, estis malgranda ĝardeno kaj iu zorgis pri ĝi, akvumis la florojn, tranĉis la herbon, de tempo al tempo fosis la bedojn. Oni diris, ke pri la ĝardeno zorgas onklino Nina, najbarino de Karina, sed Karina ne konis ŝin persone.

La loĝejo de Karina estis sur la dua etaĝo, duĉambra, oportuna kun du balkonoj, lumigitaj matene de la suno. De la balkonoj videblis la montaro, kiu ĉiam estis alloga. Somere – verda, vintre – blanka. Ordinare en la loĝejo de Karina estis silento. Ŝi malofte aŭskultis muzikon kaj nur vespere funkciigis la televidilon por aŭdi la novaĵojn aŭ spekti iun filmon.

Karina revis trovi amikon en la granda urbo kaj tio estis la kialo veni ĉi tien. En la urbo, kie ŝi naskiĝis kaj loĝis, ŝi ne trovis la amon, la viron pri kiu ŝi revis. Jam tridekjara ŝi deziris nepre edziniĝi. Ŝi laboris kiel finansistino en granda entrepreno, bone salajris kaj ŝia sola revo estis trovi bonan edzon.

Kelkfoje en la enirejo de la domo ŝi vidis junan viron, kiu forte impresis ŝin. Li estis alta, eleganta, nigrohara kun malhelaj okuloj kiel migdaloj. Karina ne sciis kiu li estas, kio estas lia nomo, sed ĉiam li afable salutis ŝin. Certe li estis inteligenta kaj bone edukita. Eĉ foje li alparolis Karinan:

- Ĉu vi loĝas sur la dua etaĝo? – demandis li.
- Jes – respondis ŝi – iom embarasite.
- Mia patrino loĝas super vi, sur la tria etaĝo. Mia nomo estas Atanas – kaj li etendis brakon al ŝi.

– Mi estas Karina – respondis ŝi kaj iom ruĝiĝis.

Ja, li estas la filo de onklino Nina, diris al si mem Karina. Post tiu ĉi renkontiĝo ŝi atendis denove vidi lin, sed la tagoj pasis kaj Atanas ne venis en la domon. Certe li loĝis en alia kvartalo de la urbo kaj nur de tempo al tempo vizitis sian patrinon, sed Karina esperis, ke iun tagon ŝi denove vidos lin. Eble li alparolos ŝin kaj povas esti, ke invitos ŝin kafumi aŭ rendevui.

Unu vesperon je la oka horo, ĝuste kiam Karina spektis la televizinoĵojn, aŭdiĝis krioj, kiuj venis de la loĝejo de onklino Nina, la patrino de Atanas:

– Helpon! Mi petas helpon!

La malesperigaj kaj korŝiraj krioj timigis Karinan. Io okazis al onklino Nina. Ĉu ŝtelistoj eniris ŝian loĝejon? La maljuna virino loĝis sola kaj verŝajne iu atakis ŝin. Aŭ eble ŝi falis kaj ne povas stariĝi. Verŝajne rompis kruron aŭ brakon.

Kelkajn sekundojn Karina hezitis kion fari, ĉu telefoni al polico aŭ al rapida medicina helpo. Tamen ŝi decidis supreniri kaj vidi kio ĝuste okazis. Rapide ŝi eliris el la loĝejo kaj ekkuris al tria etaĝo. La pordo de la najbarino estis ŝlosita kaj Karina vane provis malfermi ĝin. Ene daŭre aŭdeblis la korŝiraj veoj por helpo, kiuj tamen komencis iĝi pli malfortaj kaj pli obtuzaj.

Dum Karina staris antaŭ la ŝlosita pordo, de la najbara loĝejo eliris virino, kiun Karina ne konis.

– Ĉu al onklino Nina okazis io? – demandis la virino – Eble ŝi falis kaj ne povas stariĝi.

– Mi telefonos al rapida medicina helpo, sed la pordo estas ŝlosita – diris Karina.

-Mi havas la telefonnumeron de Atanas, ŝia filo. Mi vokos lin.

Kaj la virino telefonis al li.

– Atanas, venu rapide. Via patrino verŝajne falis kaj rompis aŭ kruron, aŭ brakon. Ŝi vokas por helpo, sed la pordo estas ŝlosita kaj mi ne povas eniri. Venu rapide!

Atanas ion diris kaj la virino estingis la poŝtelefonon. Ŝia vizaĝo iĝis kolera kaj pala.

– Kion li diris? – demandis Karina.

– Kion! Mi ne deziras ekkredi al miaj oreloj. Li ne estas filo, sed fiulo! Li diris, ke mi telefonu al lia fratino kaj mi ne maltrankvilgu lin.

– Kiel eblas! – alrigardis ŝin Karina ŝokita.

– Jes, antaŭ kelkaj monatoj onklino Nina atribuis la loĝejon al la filino, kiu havas grandan familion kaj ne havas loĝejon. Tial Atanas estas kolera al la patrino.

Post monato Karina vidis Atanas en la enirejo de la domo. Li ekridetis, afable salutis ŝin kaj provis alparoli ŝin, sed Karina preterpasis sen alrigardi lin.